

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA GAZETO □ OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO
SEN PAGA POR LA GEFEDERACIANOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO

12. strato Gracia. — SABADELL
BARCELONO-HISPANUJO

AVIZO: La Redakcio konservas al si la rajton korekti laŭ bezone la manuskriptojn. Neakceptitajn manuskriptojn oni ne resendas.

ENHAVO: Havena Propaganda Sekcio. — Flugadoj. — Mia Unua Amkiso. — Literatura Konkurso de la 2^a Kongreso de «K. E. F.». — Studkomisio pri ĉiulanda verkaro. — Pri ia deklaro. — Eksterlanda Movado. — Enlanda Movado. — Oficiala Parto. — Bibliografio. — Korespondado.

HAVENA PROPAGANDA SEKCIO DE 'KATALUNA ESPERANTISTO'

LAŭ mia propono, la Unua Esperantista Kataluna Kongreso decidis starigi Havenan Komisionon, kies celo estos propagandi Esperanton inter la maristarojn de la fremdaj ŝipoj, kiuj vizitas la havenon de Barcelono. Tiu Komisiono estis starigita, kiel propaganda sekcio de la *Kataluna Esperantisto* gazetorgano de la Kataluna Federacio.

Nia ideo estis, propagandi Esperanton en ĉiun ajn fremdan ŝipon, sed nehavo de la mono postulita de tiu entrepreno devigis nin plimalgrandigi la kampon de nia agado, kaj, atendante pli riĉajn momentojn kaj la ĉies helpon, ni decidis limigi la propagandon en la francajn ŝipojn. Por tiu entrepreno mi korespondis kun nia eminenta samideano Srö. Rollet de l'Isle, prezidanto de la «Marista Esperantista Ligo» kies senlaca kaj efika laborado estas tie bone konata de ĉiuj kaj kiu juĝante la ideon bona, pli rapide sendis la helpon ol la promeson de helpo mem.

Ni laboras en la konvinko ke nia metodo de propagando por trafi la maristaron estos sekvata plibonigata kaj disvastigata de niaj sam-

ideanoj en kiel eble plej multe da havenoj. Tio ja estas necesa por plena atingo de nia celo. Kutime, ĉiu haveno estas ĉiam vizitata de samaj ŝipoj, sekve, de samaj maristoj. Ni do, post kelkaj monatoj estos montrinte Esperanton al ĉiuj francaj ŝipoj, kiuj ankrigas en Barcelono. Estas necese, ke oni imitu nian metodon ekzemple en Coruña, kie haltas la francaj ŝipoj, kiuj krozas al Sudameriko, en New-Yorko, en kelkaj havenoj anglaj, en Suez, k. t. p. Per sistema metodo tre facile ni atingos en helkaj monatoj preskaŭ la tutan maristaron de unu nacio. Se ni varbas eĉ nur unu po cent ni ja estos allogantaj al nia movado centojn da praktikaj, spritsanaj, bravaj homoj.

Tial ni diskonigas la metodon kaj la tekstojn, kiujn ni uzos.

Ni sendos al la ŝipestroj de la ŝipoj ĵus alvenintaj en nian marbordon :

- a) Leteron al la ŝipestro en franca lingvo.
- b) Kvanta da francaj ŝlosiloj proporcia al la graveco de la ŝipo.
- c) Ĉirkuleron de la «Ligue Maritime Esperantiste — Section Française».
- d) Propagandan folion, ankaŭ en franca lingvo.

Jen la tekstoj de la dokumentoj. (Ni kompreneble cedas al ĉiuj la rajton ilin kopii kaj represi).

Letero al la ŝipestro.

A monsieur le Commandant de

Commandant :

J'ai l'honneur de vous adresser quelques brochures relatives a la *langue internationale auxiliaire Esperanto*, á l'aide desquelles on peut l'apprendre.

Votre expérience des voyages dans des pays où sont parlées les langues le plus différentes, vous a certainement déjà montré les avantages que l'existence d'un langue auxiliaire apporterait aux marins; je vous remets ci-joint quelques documents qui, à ce point de vue, vous intéresseront.

Si vous désirez de plus amples renseignements sur cette question, vous pourrez vous adresser a la *Section française de la Ligue Maritime Esperantiste*, 51, rue de Clichy, Paris.

Veillez agréer, Commandant, l'assurance de ma considération la plus distinguée.

Propaganda folio.

Ligue Maritime Esperantiste (Section Française)

(Siège Social, 51, rue de Clichy, Paris)

M. le Vice-Amiral Baile, president d'honneur.

M. le Vice-Amiral Gigón, haut membre d'honneur.

Le *Ministre de la Marine* a autorisé les officiers, partionnaires et agents de son département à faire partie de cette Association.

M. Rollet de l'Isle, ingénieur hydrographe en chef de la Marine, Président.

M. R. Mezny, professeur d'hydrographie, Secrétaire.

Correspondants à l'étranger :

Angleterre : M. Southcomte, 16, Stantford, avenue Brighton.

Allemagne : Docteur Mybs, 68, Parketrasse, Altona, a. E.

Danemark : Madame G. Mönster, 54, B. Osterbragade, Copenhague.

Russie : M. Cernohwstov, 40, loğ. 25, Malyi pr. St. Petersbourg.

Finlande : M. E. Elenius a Suursaari.

Bulgarie : M. Ćoĉo, v. š. Nadeĵda, Varna.

Espagne : M. Pujulà, 89, Rambla de Catalunya, Barcelone.

Utilité de la langue international auxilieur Esperanto pour les marins

Les marins sont peut-être de tous les hommes, ceux auxquels l'existence d'une langue internationale rendrait le plus de services.

Ils ont un tel besoin de se comprendre malgré la différence des langues nationales qu'ils parlent, qu'ils ont inventé il y a 50 ans et font couramment usage du «Code International des Signaux» qui leur permet de communiquer, quelle que soit leur nationalité, tant qu'ils restent à bord de leurs batiments.

Mais s'ils viennent à les quitter, ce moyen leur fait défaut et cette situation peut avoir pour eux les conséquences les plus gênantes et parfois les plus graves.

Un bâtiment, par exemple, demande, par le Code, un medecin à un bâtiment d'une autre nationalité : celui-ci vient à bord, mais le plus souvent le secours qu'il apporte sera très-incomplet, parcequ'il ne pourra ni comprendre l'équipage étranger, ni être compris de lui.

Quand un commandant veut entrer dans un port, il lui faut prendre un pilote; il le demande par signal et le pilote, ayant compris, vient à bord mais, une fois là, c'est a peine le plus souvent si l'on se comprend. Généralement on s'en tire avec quelques mots d'une langue nationale que savent les deux marins; mais qu'il survienne un incident de navigation, exigeant une manœuvre rapide et qui sort de l'habitude, ces relations élémentaires risquent de ne plus suffire et de causer une catastrophe.

Arrivé au port, le Capitaine a des visites à faire aux autorités, des formalités à remplir, peut-être des démarches commerciales à accomplir : il lui faudrait être polyglotte pour satisfaire à toutes ces obligations avec une égale facilité dans tous les pays où el est appelé à se rendre.

Comme il ne l'est pas, il a recours à des interprètes on est forcé de compter sur l'obligeance de ses interlocuteurs. Ces deux moyens peuvent lui faire défaut et, dans tous les cas, il se trouve forcément dans un état d'infériorité nuisible aux intérêts qu'il a à défendre.

Bien d'autres inconvénients, bien d'autres dangers même peuvent naître, pour les marins, du défaut de compréhension ; aussi est-ce travailler pour leur bien intellectuel et matériel que de propager une langue internationale.

Son adoption doit résulter surtout de l'initiative individuelle : l'effort nécessaire pour apprendre l'*Esperanto* est si petit, et les conséquences qui peuvent en résulter tellement importantes que personne ne peut raisonnablement se refuser à le faire.

D'ailleurs cette langue d'une simplicité et d'une clarté admirables est déjà parlée par des milliers d'hommes dans le monde entier et sa connaissance peut, dès maintenant, rendre aux marins de très-grands services.

ROLLET DE L'ISLE

Ingénieur hydrographe en chef de la Marine
 Président de la Section Française de la Ligue Maritime Esperantiste

Un vocabulaire technique des termes de Marine en Esperanto a été publié et est en vente à la librairie Hachette, Paris, 79, Boulevard Saint-Germain, Il a pour titre *Provo de Marista terminaro*.

M. Bourlet, professeur au Conservatoire des Arts et métiers a fait une Conférence aux *Officiers Elèves de l'Ecole Supérieure de Marine*; elle a été publiée et constitue une excellente brochure de propagande ; la demander à la Section française de la Ligue Maritime Esperantiste.

Samtempe, ni informiĝos ĉe la havenaj aŭtoritatoj pri la loko kien la ŝipo sin direktos kaj ni sendos al la Prezidanto de la Grupo Esperantista el tiu urbo la jenan karton :

« Barcelono

Kara samideano :

Ni havas la plezuron sciigi al vi, ke hodiaŭ ni sendis Esperantajn

propagandilojn al Sro. , ŝipestro de la el la franca ŝiparo ŝipo ankrita en nia haveno.

Tiu ŝipo forlasinte Barcelonon sin direktos rekte al kie vi povas fari grandan helpon al Esperanto vizitante la ŝipestron kaj parolante al li pri nia lingvo, aŭ petante tiun servon de amiko via loĝanta en tiu urbo.

Vi estos tre afabla informante nin pri la rezultato de via vizito.

La havena sekcio de la gazeto KATALUNA ESPERANTISTO
Adreso: 12, strato Gracia, urbo Sabadell—Katalunlando (Hispanujo).»

Nia sekretario notos sur kajeron la nomojn kaj cirkonstancojn de ĉiu trafita ŝipo kaj la informojn, kiujn oni sendos al ni pri la rezultato de la propagando. Laŭ tiuj informoj ni agos rilate al la ŝipo, kiam ĝi revenos Barcelonon.

Kompreneble tia propagando postulas monon. Se ĉiu esperantisto en nia lando donus al ni nur unu soldon ni havus monon sufiĉan por fari dum unu jaro saman propagandon en la ŝipojn de ĉiu ajn nacio vizitantajn nian havenon. Ni devas kompreni, ke ju pli estos Esperanto disvastigita ĉe la fremduloj des pli ni profitos el ĝi: kun niaj samlandanoj ni ja bone interkompreniĝas per kataluna lingvo! Donu do monon por tiu propagando al la delegito de la Federacio en via urbo; donu al li soldon ĉiu monate. Kolektu soldojn ĉe la kursoj, ĉe la kluboj, dum viaj ludoj; starigu soldpunon pagotan, dum viaj esperantaj interparoladoj, de tiu, kiu uzos nekorektan esprimon aŭ neesperantan vorton. Pensu, ke per la soldo, kiun vi donacos, oni aĉetos ŝlosilon, kaj ke tiu ŝlosilo eble allogos al ni homon utilan al nia Ideo. Ni ne ŝparu la semojn sur la homaran kampon. Por faciligi la kontrolon de la soldkolektado ni presigis biletojn, kiujn ni sendos al la delegitoj de la Federacio kaj al la profesoroj, kiuj mendos ilin.

Kiu lernanto rifuzos unu soldon ĉiumonate al sia profesoro?

Kiu bona esperantisto ne aĉetos almenaŭ unu bileton ĉiumonate?

La propagando al fremdulo estas plej efika ol al samlandano.

Memoru la proverbojn: «Neniu estas profeto en sia urbeto» kaj «Propra supo brogas, fremda allogas».

F. PUJULÁ

Preguem als senyors delegats i professors que vulguin recollir sòus per a aquesta propaganda, se serveixin demanar an aquesta Redacció 'l *biletaro* corresponent.

Aquests talonaris, dels quals cada full val cinc centims, són una garantia pel qui paga i pel qui demana.

S'enviïn els diners en sagells de correu de cinc centims.

Els senyors que hagin recollit diners, si a l'enviar-los no poden o no volen pagar les despeses de correspondència, poden descomptar-los de la quantitat que enviïn.

Per manca d'espai no podrem publicar el nom de tots aquells que donguin el sòu; publicarem però el nom dels delegats, professors i altres persones que recullin, ab les quantitats enviades, i el nom d'aquells que ns enviïn més de 20 bitllets.



FLUGADOJ

V

NI dum la 1911^a jaro, flugados trans alia jaro; kaj sekve, ankaŭ ni plie maljuniĝos unu jaron. Ĉio, kio ekkomencis, transiras ĝis fino; ĉio, kio eknaskiĝis, transvivas ĝis morto. Ĉu oni dubas, ke nia vivo estas flugado al amikeco, al amo, al transcendo?

Ĉu la vivo ne similas rektestarantan spegulon fajlitan per homaj ĝenoj? Vere, unu jaro estas peceto da tempo, kiun aŭkcias la Ĉiopova Mastro por ke la vivuloj anstataŭos ĝin en bonaferojn. Jen nia rolo: labori bone, barakti ĝis perfekteco, mallogi malvirtojn, danki ĉiam, ĉiam nian ekzistadon. Tuj kiam mi piedfrapis la sojlon de la nuna jaro, per akra voĉo mi kantis dolĉegan kantadon de espero. En tia momento ŝajnis al miaj okuloj, ke la mallumoj de la nokta ĉambro ekbruligis fajron varmigantan, ĉar mia koro batis kuraĝe. Mia estonteco aperas en sonĝo kiel fiakro de zig-zagaj radioj, kiujn trenis vigle tra la tempo du agloj; la vivo kaj la morto.

Mi hezitas tikli per gravaj pripensoj, laŭ rikanulo, animon dibotatan. Mia propra kokardo de flugisto, estas fasko de realeco por min frapi, por skui, por hardi nur miajn plej karajn amikojn.

VI

Enpuŝata de febra deliro, mi flugas en spacon por serĉi ion ajn, kiu al mi donos senton de feliĉo. Rimarku karaj gelegantoj: iu spritulo diris en pasinta tempo, ke ĉe la etero, duone kaŝita, estas ne-

definebla kiso. Bedaŭrinde miaj vangoj ne povas ricevi tian kison, kiu neniam tuŝos karnan vangon. La Tempo, nia simbola praavo, ĉiam senlace, dum ĉiu momento, kisas la homojn; la malsaneco ankaŭ multfoje ŝetas iajn karesojn al ni, ĉar la sankta Amo, kiu estas dia kiso, nur estas ricevota de la rozkolora vango de sennmakula virgulino. Nur en ŝiaj harflokaj, povas ripozi la Amo, por florigi ondetojn da vivo.

... Ankoraŭ la kiso nedifinebla restas kaŝita en la blua etero...

La Amo estas la pinto de nia esperanta deziro, la fajro, kiu nin varmigas, la ĉiapova batalanta ilo. La Amo estas ringo, kiu arigas ĉiujn homojn; estas lumo helanta pro sia propra potenco. Jes, la Amo estas kiso nedifinebla kaŝita en la blua ĉielo. Kaj la indulino kiu ricevos tian mirindan kison, estas la Internacia Paco, kune kun ĝia propra filo la Unúversala Frateco.

Tiu estas la nova sento veninta inter nin; la forta voko, kiu iras tra la mondo flugante per flugiloj de facila vento, de loko al loko; kaj ankaŭ, kiu kolektiĝas pacajn batalantojn sub la sankta signo de l'Espero.

F. SURROCA



MIA UNUA AMKISO

AL F-INO. C. PUIG

OKAZIS en somera libertempo. Ni pasigis kelkajn tagojn en la supro de unu el la plej altaj montoj en Katalunlando, kie staras, preskaŭ ruinigita de la tempo, arta kaj antikva monaĥejo, kiun de longe forlasis la monaĥoj, kaj kie loĝas, nun, maljuna simpatia viro kun sia filino: en ilia modesta sed pura loĝejo, niaj familioj fariĝis gastoj dum tri tagoj kaj ni, tio estas, mia amatino kaj mi, ĝuis tie la plej belajn horojn.

Matene, ni leviĝis ĉiutage antaŭ la ektagiĝo, kaj antaŭ ol la suno estis leviĝinta, ni jam atendis ĝin sidante apud bruetanta fonteto, kie ni ripetadis multfoje la ĉiam novan kaj ĉiam belan, belsonan frazon «mi vin amas». Kiam per ĝia unua lumradio la suno salutis nin, ni komencis nian gajan matenmanĝon kaj fininte ĝin ni forlasis la fonton por trakuri la arbaron, saltante kiel kapretoj, kurante tra la vojetoj kaŝitaj meze de la densa herbaro kaj serĉante la bongustajn fragojn, kiuj estis malpli ruĝaj ol la freŝaj lipoj de mia amatino.

Kiam, lacigitaj de la tro longa petolado, ni sidigis sur la verda herbon, la najtingaloj amuzis nin per siaj plej belaj kantadoj kaj ni aŭskultadis ilin atentege, aŭdante nenion krom ili; ili kantis nian amon kaj ni ambaŭ rigardadis unu la alian, nenion dirante, premante reciproke niajn manojn.

Ian tagon, post la subiro de la suno, la nebulo enŝoviĝis en la fundon de la valoj: silente ĝi suprenlitis la krutajn flankojn de la monto, ame dorlotante ilin, etendante sian vaporan vualon sur la arbaroj tie starantaj, kaŝante malrapide ilian verdan koloron, kvazaŭ ĝi kovrus per dika gaza mantelo dormantan infanon; baldaŭ ni vidis ĝin sub niaj piedoj kaj tiam ĝi prezentis al ni ravan spektaklon. Ŝajnis, ke ni estas en malgranda izolita insulo meze de grizkolora nebula maro, kies ondojn, similajn al amasoj de molega lano, nerimarkeble movis tre kvieta bloveto, ŝanĝigante iliajn nuancojn, kiujn la malrapida noktigo malheligadis iom post iom.

Fine, ĝi ĉirkaŭis nin tute kaj ni devis nin rifuĝi en la maldelikata manĝocambro de la monaĥejgardantoj, kie ni gaje pasigis la tempon per la plej agrabla babilado. Sed, allogitaj de la belegeco de la ĝuita de ni ĉarma spektaklo, mia amatino kaj mi forlasis ĉiujn kaj ni eliris sur la monaĥejan placeton.

Neniam Naturo ŝajnis al ni tiel bela!

La nebulo kuŝis ankoraŭ super la valoj, kovrante ĝuste la malgrandan ebenaĵon, kie ni staris kaj tiel dense, ke niaj piedoj eniĝis en ĝin; la vento estis ĉesinta kaj eĉ la plej delikata aerbloveto ne movis jam la ondojn de tiu maro, kiun la luno griznuance arĝentis; en la ĉiela lazuraĵo palpebrumis la steloj kaj ĝiaj ĉielarkkoloraj ekbriloj lumis kiel puregaj diamantoj.

Neeble priskribi, kion ni sentis! En la kortuŝanta silento de la Naturo, niaj voĉoj malklare resonis kaj, kvazaŭ timante malhelpi ĝian ripozon, ni senrimarke ilin mallaŭtigis, por silente rigardadi tian ravan belecon.

La samtempe sentita deziro esti karesataj de la dorlotanta nebulo reciproke nin proksimigis kaj ni marŝis tra la vojeto, kiu ĉiumatene kondukis nin al la fonto; ĉirkaŭpremanente unu la alian ni malsupreniris ĝis kiam ni estis tute kaŝitaj de la malseka nebula mantelo. La lunlumo, refraktigante, disvastiĝis kaj intensive heligis la similkotonan vaporan amason: antaŭ ni, nur ni vidis la silueton de l'antikva monaĥejo, kiu rapide malklariĝadis ĉe ĉiu paŝo nia. Fine, ni haltis, mi sentis sur mia brusto la amajn batetojn de la koro de mia amatino, kiu senkuraĝe, timigita de la grandiozece de tia spektaklo, iris malantaŭen demandante per milda voĉo, «se mi ŝin amas!» Mia

kiso. malfermigante en ŝiaj lipoj, malpermesis daŭrigi la frazon, kaj la nebulo, varmigita de nia amo, tuj disrompiĝis.

La vento forĵetis ĝin de la supro de la monto kaj ni vidis ĝin disŝirantan sian gazan mantelon je la abioj sur la fundo de la valo.

JOSEFO GRAU



LITERATURA KONKURSO DE LA
2^a KONGRESO DE LA «K. E. F.»

Temo proponita de *La Revuo* :

Verki originalan studon pri arto, pri muziko, pri poezio, pri literaturo aŭ pri historio.

(La verko devas esti ne pli longa ol 20 paĝoj presitaj de *La Revuo*).

Premioj :

1^a Premio : Unu senpaga unujara abono al *La Revuo* kaj dek libroj de la kelekto de *La Revuo*.

2^a Premio : Unu senpaga unujara abono al *La Revuo* kaj *Faraono* (3 volumoj).

3^a Premio : Unu senpaga unujara abono al *La Revuo*.

Juĝantoj : Sroj. Carlo Bourlet, F. de Ménil kaj Fred. Pujulà.

N. B. — La premiitaj verkoj estos publikigitaj en *La Revuo*.

La Konkurso estas internacia. Al ĝi povas partopreni ĉiu esperantisto. Sendu la verkojn sub koverto sur kiu oni skribos «Por la Lit' Konk.» kaj la adreson de la Federacio : «12, strato Gracia, urbo Sabadell».

La Grupo «Semo» de A. E. P. el Barcelona decidis premii la plej bonan kolekton de katalunaj modismoj, tradukitaj al Esperanta lingvo.

La premio konsistas el arta arĝenta tabulo enhavonta la nomon de '1 gajnonto.

Premio de Sro. Fred. Pujulà :

La literaturajn esperantajn verkojn de Sro. F. Pujulà (*La Rompantoj Mistero de Doloro, Frenozo, La Grafo Eravinta, La Naivulo*) dediĉitajn al la aŭtoro de la plej bona versduo (*redoli*) verstrio, au verkvaro, povanta taŭgi kiel divizo de «K. E. F.» Ekzemple.

«Unuiĝo estas forto kaj la izoleco morto»



STUDKOMISIO PRI ĈIULANDA VERKARO

(Sekvo) ¹

TIEN en nereкта komplemento

Sab. — Do, kial ili forpelas min de tien, ĉu kiel malbona. (69)

Orig. — *Doncs, perquè m'escupen d'allí; per dolent?*

Rap. — Kial do ili forkraĉas min de tie; ĉu kiel malbonan? (Rimarko pri malbona).

UNUA

Sab. — La apostolo numero unua min kompatu! (8)

Orig. — *Valgam l'apostol numero ú!*

Rap. — Min helpu la unua apostolo!

VALORI kun la sencO ATRIBUI VALORON

Sab. — Ci malhelpi min? Mi ne tiom valoras cin! (92)

Orig. — *Tu destorbarme? No t dono tanta importancia!*

Rap. — Ĉu ci, malhelpi min? Ci ne estas tiel grava! (laŭvorte: mi ne aljuĝas al ci tiom da graveco).

VESTI

Sab. — Mi cin vidas malbone vestitan, kaj ci ne devus vesti tia-maniere. (82)

Orig. — *Veig que vas mal endressat i no y tindries d'anar.*

Rap. — Mi vidas ke vi iras malbone vestita, kaj ci ne devus tiel iri.

VIRO laŭvorta traduko de kataluna *ome* = MIA KARA, MIA AMIKO, NU!...

Sab. — Ci mem, viro, ci mem... (33)

1) Mallongigoj. — Sab: Teksto de Sro. A. Sabadell. — Orig: Teksto originala. — Rap. Ĝusta traduko laŭ opinio de la Raportinto. — La numeroj montras la paĝojn. (Vidu la numerojn 4^a, 5^a, 6^a, 7^a, 8^a, 9^a, 10^a kaj 11^a de K. E.)

Orig. — *Tu mateix, home, tu mateix...*

Rap. — Ci mem, do, ci mem...

Sab. — La dorso kaj la kruroj ne interesas por tio — Viro! (14)

Orig. — *L'esquena i les cames no compten! — Ome!*

Rap. — La dorso kaj la kruroj ne estas interesaj. — Nu! (aŭ : hum!)

Ni vidu la dialogon : La desegnisto rimarkas, ke la almo-
zulo montras grandan suferon precipe per la okuloj kaj li
diras : Belegaj okuloj por desegno! La almozulo respondas :
Sed, kio doloras al mi, estas la dorso kaj la kruroj. Tiam
sekvas la rimarko de la pentristo kaj la ekkrio de la al-
mozulo, kiu egalvaloras : Diable! Al mi ili ja estas tre inte-
resaj! aŭ : Komprenoble, ĉar ne estas viaj, kiuj doloras.)

FARIGI VIRO kun la senco FARIGI GRANDA, ALTKRESKA

Sab. — Kiel ci fariĝis viro! (137)

Orig. — *Com t'has fet ome!*

Rap. — Kiel ci grandiĝis!

Sab. — Ĉu vi ne vidas, kiel mi fariĝis viro? (141)

Orig. — *Que no m'veu, com m'he fet ome!*

Rap. — Ĉu vi ne vidas, kiel mi grandiĝis?

VIRINO, laŭvorta traduko de kataluna *dòna* = MIA KARA, MIA AMIK-
INO, SINJORINO, NU!..

Sab. — Sed, virino, kial vi venis? (56)

Orig. — *Però, dòna, perquè ha vingut?*

Rap. — Sed, sinjorino; kial vi venis?

Sab. — Silentu, virino! (60)

Orig. — *Calla, dòna!*

Rap. — Nu, silentu! (aŭ silentu, ci).

Sab. — Virino, mi parolas serioze! (61)

Orig. — *Dòna, que t parlo en serio!*

Rap. — Sed, mi parolas serioze, mia kara!

Sab. — Bone, virino, iomete, kaj denove vi povos ekdormi! (64)

Orig. — *Vaja, dòna, un platel i s torna a dormir!*

Rap. — Nu, sinjorino, nur telereton da ili, kaj k. t. p.

Sab. — Virino, kial ne? (98)

Orig. — *I sí, dòna!*

Rap. — Jes, sinjorino!

Sab. — Sed, virino... (130)

Orig. — *Però, dòna...*

Rap. — Sed, mastrino...

FARIGI VIRINO kun la senco FARIGI GRANDA, FAMA, SERIOZA, RESPEKTINDA. (Enlandaĵo).

Sab. — Ju pli pentraĵojn ci pentros, des pli per ili ci fariĝos homo, kaj ju pli mi utilos kiel modelo des pli ankaŭ mi fariĝos virino, sed same ne estas fariĝi homo aŭ virino. (62) (*Efektive*).

STILO

AKUZATIVO KAJ NOMINATIVO

Sab. — Nu, kie ŝtipojn oni jam enmetis, tie oni sekvas ilin enmeti. (123)

Orig. — *Doncs allí on se n'hi ha posat, se n'hi posa.*

Rap. — Do (aŭ kaj) kien oni enmetis, tien oni enmetas. (Laŭvorte

kaj laŭsence). (Ĉiuokaze, anstataŭ «jam» estus pli ĝusta «iam»).

Sab. — Tiuj ĉi trajtoj, kiujn vi havas kiuj malsupreniras vizaĝsuben, vi ne havus ne suferinte. Mi ne scias ĉu ili estas pro doloro, sed tiel ili ŝajnas, kaj por desegni estas same kvazaŭ ili estus tiaj! (15) (Laŭvorte).

Orig. — *Aquestes ratlles que teniu, que vos baixen cara avall, sense aver patit, no les tindriau. No sé si són de dolor, però 'u semblen, i per a dibuixar es com si 'u fossin!*

Rap. — Tiujn ĉi sulkojn, kiuj malsupreniras tra via vizaĝo, vi ne havus ne suferinte (aŭ : sen antaŭaj suferoj). Mi ne scias ĉu ili estas sulkoj de doloro, sed ili tiel ŝajnas, kaj por la desegno tio sufiĉas. (Laŭsence).

Sab. — Kiujn oni pendigas ĉe la altaroj, kiel dankosigno por sanktulo. (41) (Noto de la tradukinto).

Rap. — Kiujn oni pendigas je la altarojn, kiel dankosignon.

Sab. — ... mi ne deziras la estonta gloro por mi. (52)

Sab. — Sed la larmoj de tiuj, kiuj estas patrinoj, oni viŝas per ĉirkaŭpremo, (53)

Rap. — Sed la larmojn...

Sab. — Se mi povus eltrovi tiun ĉi vivon! Tiujn ĉi liniojn kiuj ne estas linioj! Tiun, mi ne scias kio, de la esprimado! (16) (Laŭvorte).

Rap. — (Ĉiuokaze) : Mi ne scias kion. (La frazo ŝajnas ne povas esti klara por fremdulo. Mi ne povas juĝi).

Sab. — Kaj kio ci volas, ke okazu? (75)

Sab. — Mi amas cin ĝis tio deziri, kion ci deziros? (91)

Sab. — Kiel komencis cian aldonitecon? (39)

Orig. — *Com te va venir l'afició?*

Rap. — (Laŭvorte). Kkiel venis al ci la artinklino?

Sab. — Manuelo faras ŝian portreton sur tre malgranda tolo. (86)

Rap. — Sur tre malgrandan tolon.

Sab. — Mi reiros al mia mansardo, kaj nenion ni ŝuldas unu al la alian. (120)

Orig. — *M'entornaré a les golfes, i en paus.*

Rap. — Mi reiros al mia mansardo, kaj jen ĉio (aŭ laŭvorte: kaj ni estos kvitaj). (Rimarko pri alian).

Sab. — Dio gardu ĉiujn vi el la malbono! (128)

Rap. — Ĉiujn vin.

TIA KIA kiel adverboj = ESTI

Sab. — Tiu ĉi domo tia, kia ĝi funkciadas, ne estas bone. (17)

Orig. — *Que aquesta casa, tal com va, no va.*

Rap. — Ke tiu ĉi domo (hejmo) tiel, kiel ĝi iradas, ne iradas (bone), (Laŭvorte).

Sab. — Ĉu vi vidas kiel silentante, estas kiam pli bone parolas la buŝon, kiam la frunto ŝajnas pripensi. (16) (Laŭvorta traduko, kiu konservas la konfuzon de la originalo).

Orig. — *Ho veieu? Ho veieu, Isidre, com callen? Es quan parla mellor una boca, quan el front sembla que mediti.* (Stilo malbonega; nekomprenebla frazo).

Rap. — (Rimarko pri «buŝon»).

Sab. — Oni ne trompas la patrinojn. Kiam ili ion ne scias, tiam ili divenas ĉion. (53)

Orig. — *A les mares no se les enganya. Quan no saben, endevinen.*

Rap. — La patrinojn oni ne povas trompi. Kiam ili ne scias ili divenas. (Laŭvorte kaj laŭsence).

Sab. — Kaj ci ja scias ĉu ni nenion bezonas!

Orig. — *I ja 'u sabs tu si 'ns falta res!*

Rap. — Kaj ci ja scias, kiom multe ni bezonas! (Laŭsence).

Sab. — Ĉu ni devas toasti per terpomoj? — Kaj per kio? La toastoj ne konsistas el tiu per kio oni toastas sed por tio al kio oni toastas, (65)

Orig. — *Amb patates hem de brindar? — I, doncs, amb què? El brindis*

no es amb lo que 's brinda, sinò per allò que 's brinda.
(Granda manko de sintakso: «*el brindis no es amb lo que...
sinò per allò*»).

Rap. — Ĉu per terpomoj ni devas toasti? — Per kio do? La toastoj ne konsistas el tio per kio oni toastas, sed el tio por kio oni toastas. (Laŭ ŝupozebla senco). (Rimarko pri «kaj per kio?» «Konsisti el tiu per kio» «konsisti por tio al kio»).

Sab. — Kiam oni sekvas tiun metion, kiun mi ne scias kiel oni nomas ĝin. (21)

Orig. — *Que 'y sentit dir qu'han de dur els qu'emprenen aquest ofici, que jo no sé com ne diuen*

Rap. — ... tiun metion, kies nomon mi ne konas.

Sab. — Por cin sendi al la urbo, al fremdolando, aŭ kien ajn ĝi estos. (28)

Orig. — *Per a enviar-te a estudiar a ciutat, a l'extranger o allí on sia.*

Rap. — Por sendi cin studi en la urbon, al fremdolando aŭ ien ajn.

Sab. — Eble mi rigardas per la koro, aŭ per la sento, aŭ per kio ajn ĝi estas, sed koncerne... (44)

Orig. — *Devem mirar amb el cor, o amb els sentiments o amb lo que sia, però en tractant-se...*

Rap. — Eble ni rigardas per la koro, aŭ per la sentoj aŭ per io (ajn) alia, sed koncerne...

Sab. — Kiu ajn aŭskultus vin, kredus ke ni estas kio ajn. (III)

Orig. — *Qualsevol que la sentis es creuria qui sab lo que som!*

Rap. — Kion pensus pri ni, kiu aŭdus vin! (Laŭsence).

Sab. — Ne, sinjoro Instruisto, ke ili venu! — Nu!... Kiel ci diras. (29)

Orig. — *No, senyor mestre, que no vinguin! I ara!... Qué d'ius!*

Rap. — Ne, sinjoro Instruisto, ke ili ne venu! — Nu!... Kion ci diras!

Sab. — Estas pro dek centimetroj nur, kial mi ne ĝin vendis. (52)

Orig. — *Em va venir d'un pam de vendrel.*

Rap. — Nur je dudek centimetroj, mi ne vendis ĝin.

Sab. — De tiam, kiam ŝia patro mortis, kiel malmulte da rento ni havas, mi devigis ŝin iri al la Konservatorio. (57)

Orig. — *El dia que va morir el seu pare, com que vam quedar amb molt poca paga, la feia anar al Conservatori.*

Rap. — Kiam ŝia patro mortis, ĉar ni restis kun tre malgranda pensio, mi irigis ŝin al la Konservatorio.

Sab. — ... kaj mi sekvos ciajn konsilojn. Kiel ci jam donis ilin tiel bonajn al Manuelo. (115)

Orig. — ... *i seguiré 'ls teus concells. Com els vas donar tant bons a n'en Manel...*

Rap. — ... kaj mi sekvos ciajn konsilojn. Ci ja donis tiel bonajn konsilojn al Manuelo... (Rimarko pri kiel ci jam...)

Sab. — Vi havas okulojn, kiujn vi tute ilin ne meritias. (14)

Rap. — (Rimarko pri: «kiujn — ilin»).

Sab. — Kaj ĉu ci komprenas, tio estas ĉar ĉiu pano enhavas multe da ŝvitoj: ŝvito pro la semado de la greno, ŝvito por ĝin vidi kreskantan, ŝvito por timo ke la hejlado ĝin detruu, draŝa ŝvito, ŝvito por ĝin gardi, knedi, kuiri, kaj ŝvito, kiu estas pli forta ŝvito: ŝvito pro timo ne povi ĝin manĝi. (ĉ - 10) (Tute laŭvorta traduko).

Orig. — *I es que veus? Cada pa vol dir moltes suors: suor de sembrar el blat. suor de veure-l creixer, suor de por de que la calamarsada 'l mati, suor de batre, suor de guardar-lo, suor de llevar-lo i de coure-l, i suor qu'es més que suor: suor de por de no poder-ne menjar.* (Malbona, efektema, konfuza stilo).

Rap. — (Rimarko pri: «ŝvitoj» en multenombro, «ŝvito por ĝin vidi kreskantan» «ŝvito por timo ke» «draŝa ŝvito» «kuiri» «pli forta ŝvito»).

Sab. — Sed ci ne rememoras, kie ci loĝas, ke nun estas la vilaĝa ĉeffesto, ke ni devas liveri la turtojn, nek pri la meso, nek pri io ajn, pro la manio pri landkartoj. (9)

Orig. — *Es que ni 't recordes aon vius, ni que siguem a festa major, ni que tinguem d'entregar les coques, ni de missa, ni de res, amb aquesta taleia dels mapes!*

Rap. — Sed lasu min! — Ne ĉar vi memoras, ne kie vi loĝas, nek ke nun okazos la vilaĝa ĉeffesto, nek ke ni devas liveri la turt-ojn, nek pri la meso, nek pri io ajn, pro la manio de l'pen-trado. (MAPES = (landkartoj) estas slanga esprimo por nomi dezegnaĵojn).

Sab. — Sed certe okazis al vi multe da reversoj! (15)

Orig. — *Però deuen aver passat molts trastorns!*

Rap. — Sed certe vi travivis multajn kontraŭaĵojn! (Laŭvorte).

Sab. — Via mieno ne esprimas mizeron sed doloron. — Mi ankaŭ tion havas. — Sed tiun de vi nomitan, oni ne povas dezigni. (14) (Li nomis neniun doloron).

Orig. — *No 's de miseria que feu cara: es de dolor. — Ja 'n tinc també de dolor. — Però 'l que vos voleu dir no 's dibuixa.*

Rap. — Via vizaĝo ne esprimas mizeron sed doloron. — Mi ankaŭ doloron havas. — Sed tiun pri kiu vi aludas (aŭ parolas: aŭ laŭvorte: pri kiu vi intencas paroli) oni ne desegnas!

Sab. — Bone! Al la vendejo, kaj rapidu! (34)

Orig. — *Vaja! Cap a la botiga depresa!*

Rap. — Nu! Rapide al la butiko!

Sab. — Ci vidas ĝin, kvazaŭ idealo, kiu naĝas en ĉaro el oraj flamoj kun artantika matenkrepusko. (44)

Orig. — *El veus com un ideal que neda entre un carro de flames d'or, amb una aurora boreal per fondo.* (Malbonega stilo. Nekompreneble estas kiel «idealo» naĝas «inter» ĉaro el oraj flamoj kun boreala aŭroro, kiel fundo aŭ fono!)

Rap. — (Rimarko pri «kvazaŭ idealo»).

Sab. — Bildego! (41)

Orig. — *Dómino!* (Ekkrio de la ludanto, kiu ludas sian lastan ludpecon en la ludo de domeno. Ĝi havas ankaŭ kaj sekve la sencon: GAJNITA! TRAFITA!) (Eble la tradukinto intencis traduki la francan *tableau* — trafita!)

Sab. — Tio estas nervaj ekvekigoj. (66)

Orig. — *Es un desensopiment de nirvis.*

Rap. — Ĝi estas sentorporig (il) o por la nervoj.

Sab. — Do, jes: estas jam de longe ke ci ne skribis al mi. (75)

Orig. — *Doncs si: feia molt temps que no escrivies.*

Rap. — Ja, jes: jam de longe ci ne skribis (al ni).

Sab. — Kiam la semo alvenas al la aliaj, ĝi ne estas sole aĉetita per ŝvitaj: ĝi entenas gutajn sangojn de la vivo! (10)

Orig. — *Quan la llevar arriba als altres, no es sols suor lo que ns costa : són gotes de sang de la vida!*

Rap. — Kiam la semo alvenas al la aliaj, ne nur ŝviton ĝi kostis al ni sed ankaŭ gutojn de sango de la vivo! (Laŭvorte kaj laŭsence).

Sab. — Patrino, tio okazas tiel, kiel mi diras ĝin al vi. (20)

Orig. — *Es que s aixís, mare, tal com l'hi dic.*

Rap. — Ĝi estas tiel, patrino, kiel mi diras.

Sab. — Ĉu ĉar mi estas novulo? — Jes pro tio. Nun ci tion diris, ĉar ci estas novulo. (69-70)

Orig. — *Per nou? — Per nou. Ara u has dit bé. Per nou.*

Rap. — Ĉu ĉar mi estas novico? — Jes, pro tio. Nun ci trafis. Ĉar ci estas novico. (La frazo *Ara u has dit bé* estas: «nun vi trafis» nun vi parolis grave, aŭ nun vi divenis»).

Sab. — «Kompatinda virino» kaj pli da «kompatinda virino». (78)

Orig. — *«Pobra dòna» i més «pobra dòna!»*

Rap. — «Kompatinda virino» kaj ankoraŭ «kompatinda virino!».

Sab. — Funde en unu flanko granda vitraĵaro provizita per kurtenoj, kaj sube kanapo (86)

Orig. — *Al fons, a un costat, una gran vidriera amb cortines, amb una otomana a sota.* (Oni ne scias sub kio kuŝas la kanapo).

Rap. — Funde kaj flanke, granda vitraĵaro kun kurtenoj... (Laŭvorte)

Sab. — Ĉu ci estus trovinta iun, kiu estus aminta cin tiel, kaj tiel longedaŭre, kaj tiel... cin sola, kiel mi finiĝis amante cin? (87-88)

Orig. — *Que aurias trobat ningú que t'agués estimat tant i tant temps, i tant... a tu sol, com jo he arribat a estimarte?*

Rap. — (Laŭsence) Kiu estus aminta cin tiel multe, tiel longatempe, kaj nur cin, kiel mi (fine) cin amas?

Sab. — ... nek genufleksante min al ĝi. (95)

Orig. — ... *ni posant-m'hi, al davant, de genolls.*

Rap. — ... nek genufleksante antaŭ ĝi.

Sab. — Ke ci elvekas la personoj eĉ ne dirante: Dio cin gardu! (91)

Orig. — *Que despertes a la gent sense donar ni l Déu vos guard!*

Rap. — Ke ci elvekas la personojn ne dirante eĉ bonan tagon! (Rimarko pri: «personoj» kaj «eĉ ne dirante» «Dio cin gardu!» «*Deu vos guarí*» estas simpla saluto — «bonan tagon!»)

Sab. — Mi ĝin divenas al ci! (90)

Orig. — *Veritat que seré sola, aquí casa? Sí que 'u seré! Te 'u endevino!*

Rap. — Ĉu ne vere, ke mi estos sola (la sola, nura virino) en tiu ĉi hejmo (aŭ: hejme)? Jes, mi estos! Mi ĝin antaŭsentas!

Sab. — ... samprofesionanon! (92)

ATINGU (Subjunktivo havas ofte en kat. lingvo estontan sencon)

Sab. — ... sed ju pli ci atingu tion, des pli mi perdos. (61)

Orig. — ... *però com més ne tinguis, més hi perdo.*

Rap. — ... sed ju pli ci havos, des pli mi malgajnos. (Vidu PERDI).

Sab. — Brave! Vi laboras por granda pentrajvendisto? — Ne, sinjoro, por vendistino! = Ha! — Mi laboras por la posteularo. (105)

Rap. — (Laŭvorta traduko. Katalune, «posteularo» = *posteritat* estas virinseksa!! Rimarko pri: «granda» = *grava*).

Sab. — La fatalo doni al li bopatrinon, ĉar tio ĉi estas fatalo je konservajo. (101)

Orig. — *El destí d'aver-li donat una sogra, que això es un destí en conserva.*

Rap. — La fatalo doni al li bopatrinon, ĉar tio ĉi estas peklita fatalajo. (Laŭsence).

Sab. — Ĝi similas al tio; kion Manuelo pentris, kiam oni elkreviĝis lin. (106)

Orig. — *Se sembla a lo que feia en Manel en aquell temps que 'l reventaven.*

Rap. — Ĝi similas tion, kion Manuelo pentradis, kiam oni malaŭdadis lin. (Rimarko pri: «elkrevigi» laŭvorta traduko de «*reventar*» slanga esprimo, kiu signifas «malaŭdi» malbonintence kritikaĉi).

Sab. = Mi ekdormiĝis dum momento, kaj kiam mi vekigis jam li ne estis. = Ĉu li aŭ vi ne estis? (103)

Rap. — En la originala lingvo la demando estas natura, ĉar oni ne uzas la pronomon antaŭ la verbo).

Sab. — Kaj, kien ci celas, nu diru? — Mi por malkara luanto. (100)
 Orig. — *I tú per a que tires, aveiam?* — *Jo, per a llogater de barato.*
 (Slanga stilo).

Rap. — Kaj vi, al kio inkliniĝas? Ni vidu! — Mi inkliniĝas esti luanto de malkaraj ĉambroj.

Sab. — Oni ekaŭdas malproksiman orkeston kaj kriojn pli kaj pli bone aŭdataj. (144)

Orig. — *Se sent una banda tocant al lluny i crits que's van apropant.*

Rap. — Oni aŭdas malproksiman orkestron, kaj kriojn kiuj alproksimiĝadas. (Laŭvorte kaj laŭsence). (Rimarko pri: «aŭdataj» en nominativo).

Sab. — ... sed same ne estas fariĝi, homo aŭ virino. (62)

Rap. — Laŭvorta traduko. Ĉiŭokaze: «fariĝi viro». = Vidu «fariĝi homo» kaj «fariĝi virino».

Sab. — Ĉar mi ne luigis la korpon por ilin vesti. (115) (Ilin: la vestaĵojn).

Orig. — *Es que no m'hi llogat el cos per a dur-la.*

Rap. — Ĉar mi ne ludonis mian korpon por ĝin vesti (per tiuj riĉaj vestaĵoj).

AJ interjekcio, kun senco petola kaj admira

Sab. — Aj! kia viro vi ja estas! (102)

Orig. — *Ai! Quin ome que's vosté!*

Rap. — Hm! (Nu!) Kia viro vi ja estas!

Sab. — Aj, aj! La muŝoj ja falas sur la turtojn! (6)

Orig. — *Ai, ai! Les mosques bé'y cauen!*

Rap. — Nu! La muŝoj ja falas sur ilin!

Sab. — Mi estus irinta trovi cin. (55)

Orig. — *T'auria anat a buscar.*

Rap. — Mi estus irinta renkonti «aŭ: serĉi) cin.

FINO

Kiam ni ekkomencis publikigi tiun ĉi kritikon ni diris, ke ĝi estis serioza kaj serena.

Dum la publikigado, niaj samideanoj povis konstati ĉion kion ni diris, kaj ankaŭ la rimarkojn de Sro. Fred. Pujulá, al kiu ni ŝuldas dankon por la bona servo kiun li faris al nia literaturo.

PRI IA DEKLARACIO

En la lasta numero de «Lingvo Internacia» sinjoro Cart faras *Deklaracion* en la nomo de la Akademio. Antaŭ ol doni nian opinion pri ĝi kaj pri la rolo de niaj Esperantistaj Institucioj, ni plej respektive demandas nian eminentan samideanon sinjoron Boirac ĉu efektive Sro. Cart estis komisiita fari tiun *Deklaracion*, kaj ĉu ĝin aprobas la aliaj akademianoj.

LA REDAKCIO



EKSTERLANDA MOVADO

FRANĈA

Paris — En el número de Marĉ de l'important revista *Franca Esperantisto* l'legim lo següent, a lo qual, per l'importancia que té per al nostre moviment, no podem deixar de fer alguns comentaris :

«NEDISKUTEBLA TRIUMFO

La eksperimento, pri kiu ni parolis en nia lasta numero, tradukinte artikolon de la fame konita pariza jurnalo *Excelsior*, plene sukcesis. Esperanto unufoje ankoraŭ triumfis, kaj ni povas tion diri, definitive triumfis. Ĉu estas necese aldoni, ke ni ĉiuj estis certaj pri tio? La tre malfacila teksto de Abel Hermant, unue tradukita en esperantan, anglan, germanan, italan, hispanan kaj rusan lingvojn, kaj poste retradukita francan laŭ la suprecititaj tradukoj, estis retrovita preskaŭ laŭvorte en esperanta kaj italaj retradukoj. Sed la esperanta retraduko redonis plej ĝuste iaĵn nuancojn, kiujn eĉ la itala lingvo ne estis kapabla plene transdoni. La aliaj lingvoj pli-malpli proksimume alproksimiĝis al la originala teksto. Tiu rezulto montras, ke la eksperimento estis farita kun la plej granda lojaleco. La franca kaj la itala lingvoj havas la saman devenon, preskaŭ similan gramatikon, kaj plie ilia ambaŭa kunpenetriĝo daŭradis dum multaj jarcentoj. Kio nur diferencigas ilin estas malsama nacia karaktero, kiu elmontriĝas per iom malsamaj nuancoj. Oni povas diri, ke itala lingvo estis por Esperanto la plej danĝera kunbatalanto. Tamen Esperanto, laŭ la decido de la juĝintaro, venkis, ĉar, kiel diris Sro. Tristan Bernard en la spritega kaj samtempe profundsenta parolado, kiun li faris dum la festo organizita de la jurnalo *Excelsior* en la teatro *Femina*: «super la aliaj lingvoj Esperanto superiĝis, laŭ la kunkomparo de la tekstoj, per la zorgo de la detalo kaj la ĝusteco de la esprimo.»

Tiun gravan sukceson ni ŝuldas al la lerteco de du parizaj Esperantistoj, Sro. Carlo Bourlet, kiu tradukis esperanten la tekston de Sro. Abel Hermant, kaj Sro. C. Aymonier, kiu retradukis francan laŭ la esperanta traduko. Tiujn du bone konatajn Esperantistojn ni estas feliĉaj gratuli je la nomo ne nur de la francaj Esperantistoj, sed ankaŭ de la tutmondaj samideanoj. Al ili ni ŝuldas nekontraŭdireblan sukceson.

Oni povas rekomenci la eksperimenton en aliaj landoj, la rezulto estos ĉiam tute sama. La forto de Esperanto estas ne venkebla. Du samnaciaj parolante egalbone la naciaj lingvon kaj Esperanton estos ĉiam la plej kapablaj ĝuste traduki kaj retraduki naciaj tekston; aliparte du homoj samegale parolantaj du diversajn naciajn lingvojn kaj perfekte posedantaj la plej intimajn nuancojn de tiuj du lingvoj estas malofte troveblaj; oni povos eĉ diri, ke ili ne ekzistas.

Tamen multaj malantaŭirantoj rediros, ke artefarita lingvo ne povas ekzisti, ke du personoj parolantaj elpensitan lingvon malbone interkompreniĝas, k. t. p. Ni povos prave respondi al ili rakontante la eksperimenton de la 10^a de Februaro 1911, kiu estas unu el la plej gravaj datoj de nia historio. — F. DE MÉNIL. »

Els noster amics de Franĉa, saben revestiĝi tuts els llurs actes amb totes les gales i tuts els trucs capaĉos de despertar la curiositat de l'exceptic i d'atraure-l vers el nostre moviment. L'acció pública, constant, persistent, multipla, intensa dels *samideanoj* parisencs ha creat en la llur ciutat un ambient en alt grau favorable a l'Esperanto. En allò que 's refereix al nostre moviment, Paris es, com en les demés branques del saber umà, la que triumfalment, intrepidament, va a la davantera. En el moviment urbà parisenc, hi figuren (i no pas com onoraris, sinó en caracter d'actius, de cap-davanters) omes eminentes i de reputació i fama universals, els quals han fet amb la llur acció i el llur exemple, que 's donés en el nostre ideal una importancia i una acceptació que no tenen semblant en cap altra part del món.

Ara de poc, a Paris mateix, s'ha lliurat el més gran duel (duel a mort) contra les llengües naturals, del qual n'ha sortit eroicamente triumfant l'Esperanto. I, en la festa pública en la qual el Jurat, va donar el seu veredict, un dels més reputats literats francesos, en Tristan Bernard, ha fet unes declaracions que, per lo que 'ns atanyen, cal recollir.

«No sé pas què diran ara 'ls meus companys; però de mi responc que no titubejaré més: quan tindré una obra per fer traduir a l'extranger, la faré traduir, sota ma vigilancia, per un dels nombrosos esperantistes de Paris en els quals jo tinc posada tota ma confiança; i, un cop feta aquesta traducción, s'enviarà a l'extranger a un esperantista distingit. I aquest la traduirà a sa llengua maternal.»

I, en un altre paragraf de l'interviu publicada per *Le Temps*, diu també: «Vaig a escriure una novela en Esperanto, i després una obra en tres actes en aquesta mateixa llengua. Ja sabeu que, després de la conferencia que faig demà, se podran escoltar diversos troços dramatics i lirics. Se cantarà l'*Alceste*, de Gluck, traduïda: serà més sublim que mai!...»

Un altre cop, encara, Paris s'avança. Serà també per a nosaltres la *Vila Llum*. El gest eroic d'aquest escriptor al llançar-se a la brega, com deixa dit, mereix de tots nosaltres el més decidit regraciament. Imagineu-vos, demà, com augmentarà l'importancia de la literatura esperanta, quan se compleixin les declaracions anotades! Això serà senzillament la penetració pacifica en la literatura universal, i obligarà, sens dupte, als demés escriptors a imitar l'exemple.

Allí no es pas ell sol qui ha fet declaracions favorables al nostre moviment; i el nombre seguirà creixent (no cal pas dubtar-ne) després de l'indiscutible exit agut.

I quan, entusiasmat pels fets, un endreça l'esguard a la nostra terra, an els nostres omes de lletres, un se demana si som en el món, després de feta la comparança. Lluny de ajudar-hi, lluny de acoblar-se amb nosaltres, lluny d'endinsar-se en l'idea de l'Esperantisme, els escriptors catalans s'han mostrat ben

refractoris al nostre moviment. ¿Si seran de diferent condició? Tant sols alguna volta un cap se redreça per damunt dels intellectuals d'aquí i llença al vent, com un oracle, una forta apologia de l'Esperanto. I prou: ni 'ls apologistes se fan predicadors ni divulgadors! I el cercle que fatalment ens separa, quasi per complet, del rotlle intel·lectual d'aquí, permaneix intrèncable, no s'elimina. ¿Som nosaltres de diferent condició que 'ls cor·religionaris dels altres països?

Opino qu'hem d'endreçar les nostres campanyes a atraure·ns els intel·lectuals; al cap i a la fi, siguin de la mentalitat que siguin, ells afermaran i donaran relleu i valua plena al moviment esperantista català, i amb ells entrarà també triu·mfant a les entitats de cultura de primer, i paulatinament a totes les institucions cívils de l'Estat, a totes les institucions que són la força i poderiu i govern dels pobles.

Fer-ho d'altra manera opino que es erroni. Proposar-nos demà que l'Estat, o les Diputacions, o 'ls Ajuntaments, acceptin i usin la nostra segona llengua, sense que 'l poble tot senti la seva utilitat i 'n tingui consciència, es temerari i exposat al fracàs. Per fer collita abundosa cal preparar de primer el terrer, i totseguit sembrar-lo: no escatimant els preparatius del conreu es com s'assegura la collita. Fem igual nosaltres: conquerim primerament els individus, les voluntats individuals; demà les corporacions; i així, paulatinament, en linia recta, arribarem indubtablement a la fi.

En un dels meus primers articles pro-Esperanto assenyalava la necessitat d'atraure 'ls infants an el nostre moviment. Avui m'hi ratifico, car amb ells assegurem el demà. S'imposa, per a això, conquerir de bell antuvi 'l professorat; tasca a la qual poden prou dedicar-se 'ls molts professors esperantistes que militen amb nosaltres.

Cal actuar, amics; actuar constantment! Els omes que, convençuts d'un ideal, no li dediquen, o totes o en part, les llurs energies, fan tort an aquell ideal, i contribueixen al seu enderroc. L'exit triu·mfal obtingut suara a París es la logica i natural conseqüència de l'actuació constant i persistent dels companys d'allí. Si 'ls omes nostres que aquí han fet declaracions en pro de l'Esperanto; si 'ls pocs escriptors, poetes i prosistes, omes de ciencia i intellectuals de renom, que fan el camí ab nosaltres, si bé de casa llur estant, actuessin com es llur deure, i no 's contentessin del llur umil (massa umil) apoi al nostre moviment, i bravament se llancessin a la brega com els llurs companys d'altres països; podriem esperar que 'l cas de l'escriptor Tristan Bernard se reproduís ans de poc a casa nostra, com se repetirà, sens dubte, en altres països.

De l'estat platoní en que l'Esperantisme 's troba encara a la nostra terra, hem de fer-lo passar a l'estat practic. Bo es, i aduc indispensable, que sentim per l'Esperantisme quasi una idolatria; però aquest sentiment íntim hem de servir-lo per a que alimenti les nostres energies durant la lluita, per a lo practic. L'ambient sà que 'ns rodeja, flor de les nostres campanyes, hem de traduir-lo en fets, sens deixar de crear ambient. Així, demà, quan en el camí ascendent aguem, per fi, de provar fortuna en els esmentats organismes, trobarem acceptació decidida, car llavors aquí, com avui a França, la nostra acció respondrà a una necessitat. Però per tots els medis, amb totes les forces, hem de fer que aquesta necessitat sigui sentida; per conseguir-ho cal indispensablement que cadaú actui perfidiosament, toçudament, en el llur camp: els literats entre 'ls omes de lletres, els omes de carrera entre 'ls llurs col·legues, els intellectuals entre 'ls llurs semblants, els mestres entre 'ls llurs companys de professorat, etc.; tots i cadaú entre 'ls seus cor·religionaris.

I quan l'ambient i el medi seran prou favorables, quan la necessitat ans mencionada serà un fet, podrem també revestir els nostres actes de tots els ornaments i totes les gales, confiadament segurs que de l'exit públic i altrament (i aquest per descomptat), de l'exit de l'Esperanto com a llengua util a totes les manifestacions de la vida. I llavors aital triu·mf romandrà inelaborable com un fet trascendental, com ho restarà ara a l'altra part del Pireneu, sobre

tot, el cas de l'*Excelsior*. Si avui aquest cas se repetís aquí, es dubtós que tinguéssim entre nosaltres (entre 'ls nostres intel·lectuals) la decisiva influència que allí ha tingut i tindrà.

Llançem-nos, doncs, tots a la plaça pública, preparem el terrer i fem bona sembrada, que així la collita (el triomf) serà abundosa, pròdiga, exuberant.

Tant-de bo que la meua veu d'entusiasta i actiu arribi al retraïment dels companys de valua, l'acció dels quals, malaventuradament, no trascendeix encara més enllà de les parets de llurs estatges. — D. SERDÁ.

BELGICA

VII Congrés Internacional d'Esperanto (20-29 Agost 1911). — Parlant del satisfactori nombre dels que ja han remès la llur adhesió al Congrés, el nostre bon confrare Carlo Bourlet diu en el número de Febrer de *La Revuo* :

«Això ja es un bon senyal, i fins ara, en cap Congrés s'avia rebut tant aviat un tant gros nombre d'inscripcions. No obstant, això no es suficient. Tot fa semblar que 'ls congressistes seran moltíssims i que moltes persones encara no inscrites intentin viatjar a Antwerpen: per què, doncs, no s'inscriuen totseguit? Això facilitaria la tasca del Comitè organitzador. Es fàcilment imaginable la confusió que produeix una sobtada adhesió, a última hora, d'una multitud de congressistes. ¿Com pot, el Comitè, preparar i cuidar-ho tot degudament si ignora si seran mil o tres mil?»

Estimats *samideanoj*: escolteu-me! No retardeu la vostra inscripció: ompliu totseguit la fulla d'adhesió, i envieu-la a «La Sepo».

— El nombre de congressistes aderits ans del 4 de Març, es de 525:

— En el Concurs literari 'y poden prendre part tots els esperantistes. Els manuscrits han d'enviar-se, abans del 1.^{er} de Juliol, al secretari-caixer; no poden ser escrits de l'autor mateix, i han de portar un lema que 's repetirà en un sobre contenint el nom de l'autor.

«La Sepo» prega a tots els esperantistes que, a fi de donar més exit al Concurs literari, ofereixin premis per als temes que desitgin presentar.

Fins ara 'ls favoreïdors del Concurs són:

«Comitè organitzador del Congrés». — *Historia de l'Esperanto*. 20 pàgines com les de *B. E.* Primer premi: 100 francs; segon premi: 50 francs.

«Redacció de *Belga Esperantisto*». — *Novela original*. 12 pàgines format *B. E.* Premi: 50 francs.

«Grupo Esperantista d'Antwerpen». — *Sobre l'utilitat de l'Esperanto en el Comerç. Manera d'introduir l'ús de la llengua internacional en les relacions comercials*. 5 pàgines format *B. E.* Premi: 50 francs.

«La Verda Stelo». — *Sobre l'utilitat de l'Esperanto en e's obrers. Manera d'introduir l'ús de la llengua internacional en les classes obreres*. Premi: 50 francs.

Sr. Frans Schoofs. — *La vella escola de pintors flandesos*. Premi: 30 francs.

Les revistes *Belga Esperantisto* i *Oficiala Gazeto* publicaran regularment noves sobre 'l Concurs.

Per a l'organització de reunions de Secció 's prega dirigir-se al senyor general Sebert, president del «Comitè Constant de Congressos» (14, rue Brémontier, Paris), qui les inscriurà en el programa general del Congrés. «La Sepo» s'encarregarà de procurar locals per a les reunions.

— El Segon Congrés de la «U. E. A.» tindrà lloc a Antwerpen del 29 al 30 Agost 1911, totseguit després del Congrés Esperantista, del qual es independent. L'objectiu d'aquest Congrés es un examen dels treballs portats a cap i fixar-ne per al següent any. El preu de la carta de congressista es fixada a 2 sm = 5 francs (amb els documents oficials). Els que no puguin assistir al Congrés, però desitgin ajudar-lo i rebre'n la documentació, poden aderir-s'hi, com a protectors, pagant 1 sm. = 2'50 francs.

RUSSIA

Derkento (Caucas). — Durant un ball de mascares aparegué una senyoreta amb vestit personalitzant l'idea de l'Esperanto. Els esperantistes presents aprofitaren aquella ocasió per aclarir an el public el significat i l'utilitat de la nostra llengua. L'original vestit obtingué un gros exit i el primer premi del Concurs.

ANGLATERRA

Londres. Un nou progrés. — Esperanto entra com accessori en la literatura d'avui. En *Anton of the Alps*, de W. Victor Cook, novela sensacional que publica en folletí l'important diari de Londres *Morning Leader*, tot un capítol està dedicat a la visita que fa 'l protagonista al Club anarquic esperantista de Milan. El mateix ja abans havia trobat un troç de paper amb una misteriosa inscripció en Esperanto.

ESTATS UNITS

New-York. — S'acaba de fundar una «Fraternitat Esperantista Internacional d'Estudiants», l'objectiu de la qual es: 1.^o Crear fraternals relacions entre els estudiants de tot el món per medi de la correspondència. 2.^o Crear una lliga d'estudiants de tots els països. 3.^o Divulgar la llengua Esperanto.

Cotisació anyal: 0'50 sm. = 1'25 francs. Per a més detalls dirigir-se al secretari, Sr. A. P. Arnold. Ll. B. (24, St. Marks Place, New-York, U. S. A.).

SUECIA

Una proposició remarcable ha sigut presentada en el Parlament suec pel diputat Sr. Lindhagen, magistrat de Stockholm.

La proposició té per fi que 'l Govern suec reuneixi diferents institucions internacionals i que elles *iniciïn la creació d'una llengua Universal*.

L'idea sembla ser que aquesta delegació sigui fundada per crear (no escollir) una llengua per a les relacions internacionals.

Com que aquest senyor diputat sembla que ignora lo que ja 'y ha sòbres aquesta materia, els esperantistes suecs s'han encarregat de posar les coses en el lloc que 'ls correspon:

ITALIA

Florença. — La Cambra de Comerç d'aquesta població ha subvencionat amb 100 ptes. la societat esperantista, acompanyant una carta altament lloable per a la nostra llengua.

Genova. — A l'escola tecnica «Baliano», assisteixen a un curs vint professors d'ambdós sexes, els quals se proposen, després, implantar l'Esperanto a les hurs respectives escoles.



ENLANDA MOVADO

TARRAGONA

Ni ne eraris asertante ke en Tarragona ankaŭ ni denove sukcesos. Okaze de la proksima dua Kongreso de «K. E. F.» ni vizitis tiun ĉi faman urbon kaj ni konstatis ke niaj agemaj tieaj samideanoj ne malprofitas momenton nek pe-

nadon por ke la kongresaj organizaĵoj estu tute pretaj ĝustatempe. nek prokrastas klopodojn por alvarbi al ni la 'Tarragona' ajn aŭtoritatojn, eminentulojn, intelektulojn, ĵurnalistojn, k. t. p.

De antaŭ kelkaj tagoj la tieaj batalantoj propagandas per la ĵurnaloj kaj gazetoj ne nur Esperanton sed ĉefe nian Kongreson. Ni legis artikolon sur *La Cruz*, *Diario de Tarragona*, *Diario del Comercio*, *Catalunya Nova*, *La Reconquista* kaj *Tarragona Federal*.

Ankaŭ la aŭtoritatuloj prezentis premiojn por nia «Literatura Konkurso», kies temojn oni trovas aliloke.

Detale ni povos ĉion priskribi nur kiam ĉio estos pretigita. Ni parolis pri nia Kongreso kun multaj Tarragona'anoj kies interrilatoj kaj roloj en tiu urbo estas ĉefaj kaj ili asertis al ni ke la tuta urbo akceptos nin bonvole kaj kunhelpos nian agadon.

Multaj homoj, kiuj simpatias kun nia ideo, pro la invito de niaj samideanoj aniĝis al «K. E. F.» por *praktike* nin kunhelpi. Tio ja ne estas revo sed faktoj.

La anoj de la «Loka Komitato» al ni rakontis ke, okaze de la V^a Kongreso en Barcelono, kiam la kongresistoj veturis al Valencia', ĉiuj aŭtoritatoj, kaj simplaj homoj el Tarragona' iris la stacidomon ĝoje kaj ĉie saluti nian Majstron kaj kongresistojn. «Se tiam nia urbo tiel agis, ĝi decas nune nin regali, pro tio ke la baldaŭ okazonta Kongreso kies urbno estus «Tarragona - Kongreso de Esperanto», estos la Kongreso de la katalunoj, de Tarragona', nia...», ili aldonis.

Tiu entuziasmo estas antaŭsigno de triumfo, ni diris; kaj se la tieaj samideanoj senhalte, senlaciĝe laboras por nia celo, ni ankaŭ decas, almenaŭ por korespondi al iliaj klopodoj, ĉeesti kaj partopreni la II^{an} Kongreson de «K. E. F.» Ni ne forgesu, tamen ke ĝi estas *nia devo*.

Per «K. E.», de la Junia monato, ni plej detale konigos al nia legantaro la programon de la Kongreso, kaj ĉiujn notojn kaj sciigojn pri la vagonaroj, loĝejoj, festoj, konkurso, vizitoj, ekskursoj, paroladoj, ekspozicio, k. t. p.

Vi konstatos ke nek la «Loka Komitato» nek ni avaros ion por sukcesigi la Kongreson. Estas do: espereble ke la federaciaĵoj plenumos kiel ni sian devon, tial ke la prospero de Esperanto kaj de «K. E. F.» ĝin postulas.

La «Loka Komitato» de la II^a Kongreso de «K. E. F.» jene konsistas:

Prezidanto, Sro. Joan Molas; *Sekretario*, Sro. Daniel Roig; *Voĉdonantoj*, Sroj. J. Solé Granell, Domenec Obiol, Josep Vidal, Fulgenci Agustí kaj Marian Alegret.

La «Loka Komitato» klopodas por ke la Fervojaj Kompanioj faru al Sroj. Kongresanoj specialajn rabatojn sur la kosto de la biletoj de iro kaj foriro al Tarragona'. Ni juĝas tiujn ĉi rabatojn necesaj por favore faciligi la ĉeeston de samideanoj en la Kongreson.

Tial ke kelkaj samcelanoj demandis iajn sciigojn pri meso, ni devas antaŭsciigi ke okazos meso por katolikoj. Ĝi okazos en oportuna horo por ebligi al Sroj. Kongresanoj ilian ĉeeston ne malebligante ilian partoprenadon en la taskoj aŭ festoj Kongresaj. Ĝi estos organizita de apartaj federaciaĵoj.

REUS

Unua Regiona Kongreso de Ateneoj kaj Asocioj pri kulturo. — Dum la tagoj 15^a, 16^a kaj 17^a de la venonta monato Aprilo, okazos en Reus la unua Kongreso de Ateneoj kaj Asocioj pri kulturo.

Ĝi konsistas el 14 sekcioj. La sekcio pri lingvoj estos prezidata de nia amiko kaj redaktoro Sro. Fred. Pujulà:

Estas nedudeble ke nia amikc konigos al partoprenantoj de la Kongreso,

kio estas Esperanto kaj ĝian superecon, utilecon kaj taŭgecon por ĉiuj homaj rilatoj kaj ĉefe por kulturo

Ni fidas al lia sperto, lerteco kaj kulturo, ankaŭ al lia konvinkiga paroladmaniero por alvarbi la kongresanojn al nia celo.

La pioniroj ĉefe, kaj ankaŭ ĉiuj esperantistoj devas preni sur sin la devon ne lasi solan nian kamaradon por partopreni la interdiskuton kaj vidigi ke en nia situacio estas viroj krom entuziasmo.

Ĝi estos oportuna okazo por firmigi nian forton kaj nian entreprenon.

La kongresa karto kostas *una pesseta*. Por pluj sciigoj sin turni al «Centre de Lectura», Reus (Tarragona).

BARCELONO

Esperantistaj vendredoj. — Tiuj kunvenoj, kiuj okazas ĉe la grupo «Semo» atingas bonan sukceson. En la interdiskutadoj de la temoj, kiujn la ĉeestantoj proponas, partoprenas multaj samideanoj el kiuj sendube multaj farigis bonaj esperantaj paroladistoj. Ankaŭ en tiuj vendredoj okazis paroladoj faritaj de Sroj. Kurt Fritzching kaj Caparrós; ili pritraktis la temojn «Organizo de la movado esperantista en Germanujo» kaj «Historio de la naturaj lingvoj kaj Esperanto». Ambaŭ estis tre juste aplaŭdataj.

Supera kurso. — Ĉe la grupo «Semo» Sro. F. Pujulà malfermis kurson superan, en kiu partoprenas multaj esperantistoj. La metodo sekvata permesas partopreni en tiu kurso eĉ nebarcelonanoj ĉar oni respondas koresponde al ĉiu kursano loĝanta en alia urbo. En la «Esperanta Rubriko de *La Publicidad*» de la 9.^a de Februaro aperis artikolo per kiu detale oni klarigas la metodon.

Novaj kursoj. — En la sidejo de «Espero Kataluna» estas malfermita kurso klarigata de Sro. Pallejà. Ĝi okazas ĉiumarde kaj vendrede de la sepa ĝis la oka horo vespere.

Ĉe la grupo «Esperanto kaj Patrujo» estas klarigataj du kursoj de sinoroj M. Bermudez kaj J. B. Albiñana. La unua okazas lunde merkrede kaj vendrede de la naŭa ĝis la deka vespere, kaj la dua ĉiudimanche de la dek unua ĝis la unua matene.

Nova Komitato. — La grupo «Barcelona Stelo» elektis la novan jenan komitaton: *Prezidanto*, Esteve Rey; *Vic-prezidanto*, Josep Casas; *Sekretario*, Joan Gili; *Vic-sekretario*, Josep Insensè; *Kasisto*, Marian Pascuet; *Kalkulisto*, Antoni Cruz; *Bibliotekisto*, Pompeius Molgosa; *Voĉdonantoj*, Joan Delclós, Joan Puig, Roseta Cortés kaj Marina Reig.

Teatraj festoj. — Ĉe «La Rondo» okazis la 29^{an} de Januaro, teatra prezentado de *Mistero de doloro* kaj *La Santa*.

Ni tre ĝojas sciigante ke ĝi estis vera sukceso; post ĉiu akto la ludintoj estis devigataj danke saluti diversfoje kaj post la lasta oni devigis la tradukinton Sron. Pujulà saluti de sia loĝio por ĉesigi la aplaŭdadon. La ĉeestantaro estis multenombra. Post la prezentado de la kataluna verko *La Santa*, kiu ankaŭ plensukcesis, oni finis tiun agrablan feston per tre amuza dancado.

Organizita de «Esperanto kaj Patrujo» okazis la 11^{an} de Februaro teatra festo dum kiu oni prezentis la esperantan tradukon *Edziĝo kontraŭvola*. La ludintoj estis aplaŭdataj kaj speciale Sron. Viñas.

Okaza Artisto'n ludis Sro. Albiñana kies klopodo estis laŭdinda; la kataluna verko *Un bon debut*, plene sukcesis, precipe pro la ludado de Fino. Berdemás kaj Sro. Viñas.

Finiĝis la festo en agrabla dancado kaj kantado de la Esperanta Himno.

Vizito. — Organizita de la grupo «Espero Kataluna» okazis la 26^{an} de Februaro vizito al la Socia Muzeo.

La vizitantoj estis ĉirkaŭ cent inter kiuj oni vidis grandan aron da belaj fraŭlinoj. Ni vidis inter la vizitantoj Finojn, kaj Srojn, Cases, Rosals, Renom, Anglada, Valero, Bartomeu, Riera, Cunill, Urbez, Pellicer, Sabater, Gili, Aubeyzón, Campdelacreu, Ferrer, Carsi, Moliné, k. a.

Ĉiuj estis kontentigitaj de la afabla akcepto kiun al ali oni faris kaj oni impresis kelkajn fotografaĵojn.

Parolado. — La 11^{an} de Februaro, Src. D. Dalmau faris paroladon ĉe la grupo «Racionala Kulturo» pri la temo «L'actual estat del problema d'un idioma internacional impona a totes les persones civilisades i cultes el dever d'apendre l'Esperanto». La konferenciinto estis gratulata.

Esperantistaj vespermanĝoj. — Tiuj vespermanĝoj okazantaj ĉiu deksesas estas ĉiam en sukceso. Ili de nun okazos ĉe la restoracio Moritz: ĉiu esperantisto loĝanta en Barcelono la deksesan de iu ajn monato renkontos tie esperantistajn kamaradojn, kiuj kore akceptos lin.

MANLLEU

Ĉe la societo «Asociació Catalanista, Rafel de Casanova» en kurso donata de Sro. Grivé ĉeestas 12 fervoraj junuloj, kiuj sendube sukcesos en nia lingvo. Ankaŭ sekvadas kursoj ĉe «Esperantista Amikeco».

«Esperanta Amo» aliĝis al la Federacio: — *La Delegito.*

SABADELL

En la societo «L'Americana» okazis la tagon 25^a de Marto, gravan esperantan feston en kiu partoprenis Finoj, Maria Planas, Teresa Torra, Josepha Figuerola, kiuj legis tute bone *La Kvieteco*, *La Celo* kaj *La Simbolo de l'Amo* de nia kara germana samideanino Marie Hankel.

Ankaŭ legis prozaĵojn pri esperanto Sroj. Ll. Busqueta, M. Peig kaj G. Sobré.

Ĉiuj partoprenintoj estas anoj el «Aplec Esperanta Grupo».

Oni diras al ni tute konfidencie, ke la esperanta sekcio de la grava societo «Centre de Dependents» organizas esperantan «meeting».

Ŝajnas al ni bona la ideo.

CERVELLÓ

Por festi la inaguracion de la societo «La Verda Stelo» okazos la tagon 2^a de Aprilo granda festo ĉe «Ateneo Cervellonense».

Ni parolos pri ĝi en nia venonta numero.



OFICIALA PARTO

El Comitè Directiu de «K. E. F.» rebé del Comitè local del V Congrès el dokument que, copiat literalment, diu:

«Al Sro. G. Balsells, Kasisto de la V^a Internacia Kongreso.

Kara kolego kaj amiko: En hieraŭa kunveno, kie ĉeestis Sroj. Sabadell,

Sales Balmes, Bremon Masgrau, vi mem, mi kaj sinjorino Pujulà-Rebours, ni subskribis documenton, el kiu mi eltiras la jenan konkludon ĝian, kiu rilatas vian oficon en la Komitato :

«Ni decidis ne donaci la monon al Espero Kataluna nek al iu alia aparta grupo, sed al ĉiuj kune en la kason de la Federacio; kun la voĉo kontraŭa de Sro. Sabadell, kiu rifuzas subskribi la dokumenton.» Ni petas per tiu ĉi dokumento al la Kongresa Kasisto, nia kolego Sro. G. Balsells bonvolu transdoni al la kasisto de la «Kataluna Esperantista Federacio» la kvanton da sepcent kvardek sep (747) pesetojn, triono de la profito de la V^o Kongreso, pri kiu ni decidis.

Vi estas do petata bonvolu plenumi la decidon kaj transdoni tiun kvanton al Sro. J. Piferrer, kasisto de la nomita Federacio.

Akceptu kara amiko mian kolegan saluton.

Barcelono 28^o Februaro, 1911.

Fred. Pujulà.»

El Comitè de «K. E. F.» dóna les més corals mercès, en nom de les trenta-dues societats aderides a la nostra «Federació», al Comitè del V Congrès Internacional, per la seva encertada decisió.

Com se desprén del document més amunt transcrit, ingressà tot-seguit dita quantitat a la caixa de la Federació.

Han ingressat darrerament a «K. E. F.» les societats següent: «Amo kaj Espero», de Girona; «Esperanta Amo», de Manlleu; «Unió Catalanista», «Novan Vojon» i «Esperanta Frateco», de Barcelona. A totes la ben-vinguda.

Així mateix ha deixat de formar-ne part «La Kvinpinta Stelo» per aver deixat d'existir.

El Comitè de «K. E. F.» ha enviat als grupus no aderits an el nostre organisme la següent comunicació:

«Estiminda Sro.

Antaŭ longe, la organizintoj de la «K. E. F.» sendis al vi sciigon pri la starigo de nia Federacio ĝian regularon, alvokon, aliĝilojn kaj specimenojn de ĝia organo nome *Kataluna Esperantisto*.

Pro tio ke ĝis nun ni ne ricevis vian aniĝon al «K. E. F.» nek vian kunhelpadon, ni opinias oportune nin turni al vi fervore kaj insiste, petante bonvolu meti atenton sur nian organizadon kaj ĝian disvastiĝon, kaj nin sciigi ĉu vi juĝas nian asocion inda je via klopodo.

Per la specimenoj antaŭe nomitaj, vi povas studi kia estas nia celo kaj nia entreprenita vojo: ripeti en ĉi tiu letero al vi, ĉiujn argumentojn kiuj vi mem trovos en niaj dokumentoj cititaj estos superflue.

Ni devas klarigi al vi, tamen, ke la Komitato de «K. E. F.» devas prezenti en la 2^o Kongreso okazonta en Tarragona, nian regularon reformitan, al kiu kompreneble, povos ĉiuj federacianoj prezenti reformojn aŭ klarigojn, ĉar estas opinio nia, ke la «K. E. F.» kiu celas esti la riprezentanto de ĉiuj katalunaj esperantistoj, devas esti starigita kaj plibonigita de la pensoj kaj klereco de ĉiuj ĝiaj elementoj, en tio kio koncernas al Esperantismo kaj Esperanto.

Estus por ni grandega malĝojo, ke malgraŭ la volo agado kaj klopodo de ĉiuj niaj gealiĝintoj, vi juĝus nian Asocion male je kio ĝi estas, kaj ĉar ni intencas forigi ĉiujn ĝiajn barojn kaj neperfektaĵojn, en la celo sukcesi kunigi ĉiujn katalunajn esperantistojn tute harmonie kaj fervore en unu

sola vasta unucela familio, ni petas plej insiste al vi nin sciigi skribe antaŭ la 15 de Majo, la kialojn kiuj malebligas al via grupo — kies inda Prezidanto estas vi — la aliĝon por plene atingi nian al vi sciigitan celon.

Longe vivu por la bono de Esperanto. — La Prezidanto, *Dro. J. Bremon*; La Sekretario, *J. Pujol*.



BIBLIOGRAFIO

Ni nur raportos pri verkoj duope senditaj al la Redakcio.

Poliglota Vade-Mecum de Internacia Farmacio, de Célestin Rousseau. 1 vol. 288 paĝa, bindita. Eldonejo : Hachette & K^o Paris; prezo : sm. 3 = fr. 7,50 = shill. 6 = markoj 6,2 = dollar 1,5 = rubl. 3 = florenoj 3,75.—

Necesa komplemento de ĉiu nacia Farmakopeo (ĉar ĝi ebligas la faradon de fremdaj receptoj) tiu libro estas tute novspeca. Ĝi estas elpensita, kun espero, ke ĝi povos utili al ĉiulandaj farmaciistoj kaj kun tiu speciala celo : faciligi la preparadon de medicinaj receptoj alportitaj *el fremdaj landoj*.

Tiu farado estas ofte ne efektivebla, ĉu pro la nescio de la lingvo, ĉu pro la nesameco de la formuloj de samnomaj medikamentoj en la diversaj Farmakopeoj.

Tiu ĉi libro neniel intencas solvigi *ĉiujn* malfacilaĵojn, kiuj sin prezentos praktike al farmaciisto, preparanta fremdan recepton; tamen la aŭtoro esperas, ke ĝi efike helpos en oftaj okazoj. — Atendante, ke la «Komisio por Internacia Farmakopeo» estu definitive starigita, por entrepreni tiun necesejan laboron, pasos kredeble multe da jaroj.

Tial la aŭtoro opiniis, ke estus taŭge kunigi en tiu ĉi libro, sufiĉan nombron da formuloj. eltirita el Farmakopeoj eŭropaj, amerikaj kaj japana.

Tiu libro enhavas :

1^e Ĝeneralajn dokumentojn pri pezoj, mezuriloj, monoj, densimetraj, numerado... de diversaj landoj.

2^e Vicon de komparaj tabeloj por formuloj de Ekstraktoj, Tinkturoj, Piloloj... en diversaj Farmakopeoj.

3^e Formularon de multaj preparaĵoj ofte ordonataj en la origina lando.

4^e Profesian Vortaron 9 lingvan aranĝitan tiamaniere, ke ĝi estas uzebla de ĉiu persono leganta unu el la lingvoj jenaj: angla, franca, germana, hispana, holanda, itala, rusa, sveda kaj Esperanto.

Oni trovos en tiu parto 72 vortarojn en unu sola:

La aŭtoro elektis, por tiu libro, la lingvon «Esperanto», tial, ke ĝi estas Sintezo de ĉiuj niaj eŭropaj lingvoj; tial ke ĝi estas modelo de logika simpleco; tial, ke oni povas lerni ĝin post kelkaj horoj; tial, ke sola, ĝi ebligis la verkadon de tiu libro mem; ĉar ĝi estas farita per kunlaborado necesa de farmaciistoj de la 8 landoj suprenomitaĵ.

Tiu ĉi libro, do, sin turnas al ĉiuj apotekistoj, al ĉiulandaj apotekistoj, do

ne nur al farmaciistoj esperantistoj. — *Ĝi estos komprenebla por ĉiuj, ĉar ĝi ne enhavas tekston, sed nur tabelojn, kolonojn, ciferojn, formulojn, kaj plie Universalan Vortaron*, kiu donas tujan tradukon de ĉiu vorto, termino aŭ esprimo, kiu povas esti skribita sur medicina recepto.

Esperantista Poŝkalendaro 1911. redaktita de Prof. Dro. Siegfried Lederer. Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin. Prezo : 1 m. (0,500 sm.)

Kvankam la materialo en tiu ĉi nova eldono de ia tre ŝatata libro estas multe pli riĉa kompare kun tiu de la antaŭa, la libro ĉi tiufoje estas eĉ iomete pli maldika ol la lasta, dank' al la bone pripensita tute nova kompostarango. En la unua parto de la libro la memorindaj datoj estas tre pliriĉigitaj kaj kune metitaj antaŭ la tutan dataron. Per tio kaj per nova arango de la dataro oni gajnis sufiĉe da loko en la unua parto, por enmeti kelkajn novajn tabelojn tre praktikajn. La dua parto ree enhavas la liston de la grupoj k. t. p., kiu estas tute nove kompostita kaj korektita laŭ la plej novaj oficialaj informoj; ankaŭ listo de la esperanta gazetaro estas aldonita. — La libro estas ornamita per portreto de Sro. Van der Biest-Andelhof, la prezidanto de la Sepa Kongreso, kiu verkis por la Poŝkalendaro interesan artikolon pri Antwerpen, la urbo de la Sepa. Rimarkinda novaĵo en tiu ĉi eldono estas enigma konkurso kun 50 sm. da mon- kaj libropremioj, kiu certe plaĉos al la aĉetontoj. Laste estu menciita, ke oni enmetis, laŭ ofte esprimita deziro, sufiĉe da blankaj folioj el bona papero por notoj. — Entute la libro prezentas sin kiel bonega helpilo kaj informilo, kiun devus posedi ĉiu samideano. — Specialan laŭdon meritas Sro. Prof. Dro. Lederer pro la zorgemo, kun kiu li plenumis sian taskon kiel redaktoro de la Poŝkalendaro. Precipe la kunmeto de la listo estas tiel mal-facila kaj penplena, ke oni devas miri pri la farita de li laboro.

Esperanto-Poŝkalendaro, por 1911^a, eldonita de la redakcio de la gazeto *La Esperantisto*. — Redaktoro kaj eldonanto Fritz Stephan. — Kochstr, 61, Leipzig. Prezo : 0'30 sm.

Ĝi enhavas humoraĵojn, statistikojn, sciigojn, pri Esperantajn artikolojn, kaj multajn sciigojn en Esperanto kaj germane tre utilajn por germanoj.

Flanke de la dataro kaj en la fino de la broŝuro estas spaco por notoj.

Amoro kaj Psiĥe, de Lucius Apulejus. El latina originalo tradukis Emilo Pfeffer. — Esperanta Biblioteko Internacia (Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin.) — Prezo : 0'20 sm.

Antaŭ longe katalune mi legis tiun ĉi mitologian rakonton, kiu dum la relegado ree plaĉis al mi kaj min allogis. Verdire ĝi estas tradukita en bona Esperanto kaj flue skribita ne enhavante nenian makuleton malpermesantan la komprenon de la verko.

Mi diris «mitologia rakonto». Eble oni kredos ke Amoro kaj Psiĥe ne estas interesa pro tio ke mi juĝas ĝin tiel, tamen kvankam ĝi estis verkita en la dua jarcento p. K. multaj nuntempaj aŭtoroj envios al li ĝian stilon. Ĝi estas rakonto ankaŭ taŭga kaj tute interesa por la neinfanoj kaj maturaj homoj.

Ĉio estas en ĝi priskribita belmaniere kaj sprite kaj per stilo kaj simpleco mirindaj la rakonto disvolviĝas alloge, naive. Ĝi tuj kaptas la intereson por si, kaj rave oni eltrovas la homajn neperfektecojn, pasiojn, kaj malbonajn morojn en la mitologiaj dioj.

Kaj kiel mi antaŭe diris la traduko tute helpas. Gratulojn meritas Sro. Pfeffer kaj la firmo Borel & Morel. — D. S.

Ben-Tovit, rakonto de Leonido Andree. Tradukis Dro. A. Fiŝer-Tifliso. «Esperanta Universal-Biblioteko». — Kolekto de «Riga Stelo». — N^o 1. — Prezo : 0'10 sm.

La gazeto *Sveda Esperantisto*, kiu dum 1910 estis eldonata kiel organo de la sveda esperantamovado, nun ĉesis kaŭze de fondiĝo de nova gazeto *Esperantofolket*, kies redaktoro estas S : o Backman en Helsingborg. La nova gazeto precipe celas la propagandon; kaj laŭ plano ĝi estos aĉetebla en ĉiuj ĉefaj gazetvendejoj de la tuta lando.

Ĝus komenciĝis la dua jarkolekto de nia famekonota, lukse presita kaj bele ilustrita gazeto *Universo* «eldonejo Heckner en Wolfenbüttel, Germanujo). Certe granda ĝojo regos ĉie en esperantistaj rondoj kaj rondetoj, ke ni havas eĉ tian noblan ĵurnalen en Esperantujo. Ĉiu numero de la pasinta jarkolekto enhavis artan aldonon kaj multajn ilustraĵojn. Ne ekzistas pli bona propagandilo por nia kara lingvo ol tiu ĉi revuo. Ĉiuj neesperantistoj ĉiam miras, se ili vidas ĝin. Ofte oni aŭdas : ho, se tia gazeto en Esperantujo estas ebla, la tuta movado devas esti vivplena. Tial ĉiu grupo devas aboni ĝin, ĉiu samideano devas havi almenaŭ unu numeron, por montri ĝin al niaj kontraŭuloj kaj al la skeptikuloj. La nobleco kaj riĉeco de la gazeto konvinkos multajn. Jarabono kostas 3 sm.; kiu sendas al la eldonejo : Heckner en Wolfenbüttel (Germanujo) du respondkuponojn, volonte ricevos provnumeron,

La 1^{an} de Aprilo aperos la unua numero de *Moderna Humoro* monata ilustrita esperanta 20 paĝa gazeto por Humoro, Ĝerco kaj Satiro. Jara abonprezo 2'40 m., 1'20 sm.

Specimena numero dissendas por respondkupono Fritz Stephan, Leipzig, Germ., Kochstr, 61.



KORESPONDADO

Sro. J. S. (Reus). En n^o 4^a de K. E. ni diris «ni nur enpresigos *poeziaĵojn* sed ne versaĵojn». Kaj por vi ni aldonas : lernu bone Esperanton!—Sro. J. V. (Terrassa). Bedaŭrinde via tradukaĵo estas tro longa. Vi komprenos ke ni ne havas sufiĉan lokon por ĝi, en unu sola numero, sed ni penas por vin komplesi. — Fino. Saltiveri. La n^o kiun vi petas, estas elĉerpita.